

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

N° 6
JUNIO
1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.
Post-ĉek-konto : 1438-67 Nantes ;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.

Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse, Francio.*

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham, 30, Anglio.*

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry (Nord).*

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé (M.-et-L.).*

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro A.J. HICKS el Parkstone.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden.*

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.I.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana.*

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tulmondaj Interlernejaj Rondo*j Marcel ERBET-
TA, rue des Pins, 66, *Bienne-Biel* 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubeble ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pereji.

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

*
**

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia loĝloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 provekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.


Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

F. NOVLJAN.

THEODOR ĈEJKA

En la II. volumo de *Historio de la lingvo Esperanto* de Edmond PRIVAT sur p. 105 staras : « Jam en 1903 moravia kaj svisa instruisto, sinjoroj ĈEJKA en Bystrice-Hostyn kaj DUCOMMUN en La Loche, iniciatis internacian korespondadon inter infanoj lernintaj Esperanton ». Kiam mi komencis verki artikolojn pri esperantistoj kaj esperantismo por Jugo-



slavia enciklopedio, mi opiniis, ke mi nepre devas skribi pri homo, kiu la unua enkondukis Esperanton en lernejon kaj la unua gvidis esperantan infankorespondadon.

Unue mi tralegis tion, kion pri li raportas la *Enciklopedio de Esperanto* (1). Tio ŝajnis al mi tro malmulte. Tial mi skribis al s-ro ĈEJKA naskiĝis la 10-an de pri lia vivo kaj verko. Li afable respondis, kaj ĉi tiu mallonga lia biografio ekestis el liaj informoj.

Theodor ĈEJKA naskiĝis la 10-an de Januaro 1878 en urbo Holešov en Ĉeĥujo. (La informo en *Enciklopedio de Esperanto* ne preciza!). En la jaro 1894 li komencis studi en porinstruista instituto en Pribor. Post la fino de la studado en la jaro 1898 li komencis instrui kiel subinstruisto en malgranda urbo Bystrice sur Hostyn (5.000 loĝantoj) en Moravio, kie li agadis dum kvardek jaroj kaj kiel emeritulo vivas ankoraŭ nun.

La unuan sciigon pri Esperanto li trovis en gazeto « *Concordia* », organo de « *Cosmos* » (Amsterdam). Detalan informon li ricevis de ruso Ivan SETALOV el Petersburgo (Leningrado). Kun siaj kolegoj Jan HOBUB kaj Valentin BILIK li komencis entuziasme lerni kaj propagandi la internacian lingvon. En la jaro 1900 li eldonis sian unuan broŝuron « *Světova reč* » (Monda lingvo). En la sama jaro ĝin sekvis lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj. Eminentan kunlaboranton li trovis en sia kolego, fama kolumniologo, Josef KRUMPHOLC, kiu helpis lin ĉe novaj eldonoj de la lernolibro. Ambaŭ aŭtoroj daŭre plibonigadis sian verkon tiel, ke la kvara eldono, kiu aperis en la jaro 1908 jam estis tre detala kaj perfekta. En la sama jaro aperis ankaŭ liaj detalaj vortaroj esperanto-ĉeĥa kaj ĉeĥo-esperanta. En la jaro 1902 li komencis eldoni tri gazetojn : « *Internacia revuo* », « *Cesky Esperantista* » (Ĉeĥa Esperantisto) kaj « *Der Deutsche Esperantist* » (Germana Esperantisto). La unua estis destinita por la tutmonda esperantista publiko. Ĝia ĉefa kunlaboranto estis ruso Ivan SELEZNJOV, kiu tiam vojaĝis tra la mondo kaj haltis en ĉeĥaj landoj. La dua propagandis inter la ĉeĥoj kaj la tria inter la germanoj. De la Internacia revuo aperis kvin numeroj, bele presitaj kaj kun rimarkinda enhavo. De la Ĉeĥa Esperantisto aperis 9 numeroj kaj de la Germana Esperantisto 5. En la jaro 1908 li komencis eldoni la « *Internacian Pedagogian Revuon* ». (Vidu I.P.R. 1956, p. 118).

ĈEJKA partoprenis kvar Universalajn Kongresojn (Genevo 1906, Kembriĝo 1907, Dresdeno 1908 kaj Prago 1921), entreprenis studvojaĝojn al Germanujo, Nederlando kaj Belgio, estis iniciatinto, organizinto kaj kasisto de la *Internacia Asocio de Instruistoj*, laboris kontraŭ alkoholismo, nikotiniĝo, poste por skoltismo, turismo kaj ĝardenismo.

ĈEJKA petis permeson de la porlernejaj aŭtoritatoj por instruado de Esperanto en sia lernejo, kaj ricevis ĝin. Tiam li instruis en pli altaj klasoj. Kiam la ler-

(1) Budapeŝto, 1933.

nantoj iom sciis Esperanton, li donis al ili adresojn de fremdaj samideanoj, kun kiuj ili ekkorespondis. Kelkaj el liaj lernantoj restis ĝis nun fervoraj esperantistoj, kelkaj uzis la lingvon eksterlande. Lia estinta lernanto Francisko CHVATIK fariĝis ĝardenisto; helpe de Esperanto li trovis postenon en botanika ĝardeno de Graz (Aŭstrio), poste en Triesto (ĉe Adriatika maro), Thun (Svislando), Parizo, Londono kaj Danlando. La unua mondmilito devigis lin reveni hejmen. Li korespondas kun multaj samfakuloj en la mondo, kaj interŝanĝas valorajn sciindaĵojn pri botaniko. Per Esperanto multe li profitis science kaj finance, ĉar li fariĝis eminenta specialisto.

En la jaro 1906 ĈEJKA eldonis broŝuron « *El la historio de Esperanto* », en kiu li publikigis la leteron de d-ro ZAMENHOF al N. BOROŬKO pri la deveno de Esperanto, la paroladojn de ZAMENHOF kaj de d-ro K. BEIN (KABE) en la 1-a

kongreso de esperantistoj en Bulonjo-ĉe-Mar, 1905.

Theodor ĈEJKA per siaj eksterordinaraj kapabloj kaj laboremo povis fari altan karieron, sed li preferis resti en malgranda urbo, kiel modesta instruisto, ĉiam sur sama laborloko, pacience agante kaj sinoferante por la bono de la homaro. Post tri operacioj jam preskaŭ kvin jarojn li kuŝas grave malsana. Se ni pripensas la grandegan laboron, kiun li faris, kaj la multan monon, kiun li elspezis por antaŭenigi la esperantistan movadon, ni devas konstati, ke li estas unu el niaj grandaj pioniroj. Sed li ne povus tion plenumi, se li ne havus la feliĉon trovi noblan vivkunulinon, Dobroslava ĈEJKOVA, kiu komprenis lin kaj la senmortan Zamenhofan ideon. Ŝi helpis lin ĉiam, dum bonaj kaj malbonaj tempoj. Ankaŭ nun ŝi vartas kaj flegas lin kun amo fidele kaj ofereme.

NIA DISKUTEJO

PURITANISMO

La aserto de mia ŝtata literatura kolegino, Marjorie Boulton, ke en Britujo « puritanismo estas nacia malsano » estas absurda, kaj pruvas, ke genia poeto povas havi tre eraran juĝon pri socia vivo ĉirkaŭ si.

La temo estas tro vasta por plena diskuto en via gazeto. Mi memorigas nur, ke Britujo estis pionira en la liberigo de la juna virino. Komparu ekzemple la situacion de la juna virino en Anglujo kaj Francujo ĉirkaŭ 1930. Kaj ankaŭ nun?

K.R.C. STURMER.

RESPONDO AL SINJORO STURMER

Mi ja scias, ke ĝeneraligo povas ĉiam esti danĝera. Dum miaj profesiaj laboroj, mi ĝis nun vizitis eble 50 britajn lernejojn, kaj per tiuj travivaĵoj, plus multaj aliaj profesiaj problemoj, mi venis al mia opinio pri puritanismo en Britujo. Mi facile povas kredi, ke S-ro Sturmer, en alia loko, alia medio kaj inter aliaj individuoj, spertis la vivon malsimile.

Marjorie BOULTON.

SCIENCAJ STUDOJ

Okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (Aŭg. 56) oni decidis eldoni jubilean verkon ĉe ĉirkaŭ 250 paĝoj en granda formato (kiel « Esperantologio »).

La libro enhavos traktatojn, artikolojn kaj eseojn raportantajn pri originalaj esploroj de esperantistaj sciencistoj faritaj en la laborkampo mem de la koncernaj kontribuantoj.

La jubilea verko estos kultura evento en la historio de Esperanto.

La redaktoro de tiu verko, kiun ĉiu posedu, estas D-ro Neergaard, redaktoro de Esperantologio. Antaŭmendu, sendante 38 stelojn al via landa peranto de I.S.A.E.

NOVA NOVELARO

DE JOHAN HAMMOND ROSBACH

En la KOKO-serio, *Randbolvej* 4, Kopenhago F, sub redakto de Poul Thorsen, ĵus aperis la tria volumo: *Homoj kaj Riveroj*, de Johan Hammond Rosbach. Ĝi estas originala novelaro 140-paĝa (prezo 12 d.kr.) kun arta kovrilo de Per Lundgreen. La lingvo estas eksterordinare facilflua.

La nova eldonejo KOKO ŝajne sukcesas en sia persista penado ĉiujare aperigi literature altkvalitan verkon originale en Esperanto. Aperis ĝis nun *Rozoj kaj Urtikoj*, de P. Thorsen, *Ezopa saĝo*, de K. Kalocsay — kaj en preparo estas originala romano de F. Szilagyi. Iniciato grava por lingvo kaj movado kaj sekve subteninda.

Recenzo pri *Homoj kaj Riveroj* sekvas.

Marjorie Boulton

SEMANTIKA EDUKADO PER ESPERANTO

Ni volas enkonduki Esperanton en la lernejojn. Prave. Ni kutime diras, ke Esperanto helpas infanojn lerni aliajn lingvojn kaj kompreni gramatikajn konceptojn; prave. Ke Esperanto helpas infanojn al tolerema kaj malŝovinista sinteno, faciligante kontaktojn kun alilanduletoj. Prave ja. Ni ankaŭ scias, ke Esperanto povas helpi geografiajn kaj historiajn studojn kaj igi ilin pli interesaj; multaj instruistoj jam starigis ekspoziciojn, ekzemple de infanarto, pere de Esperanto; bonege! Tamen, eble ni inklinas forgesi alian utilan argumenton, kiu utilos precipe inter tiuj troerudiciemaj, trotradiciemaj tipoj, kiuj malŝatas Esperanton kiel lernejan fakon grandparte ĉar ĝi estas « tro facila », kvazaŭ risko ekzistus ke la homa vivo iĝus tro facila!

Mi iom dubas pri la valoro de la tiel-nomita « klasika eduko », bazita sur la greklatina literaturo; sed dum multaj jaroj tia eduko estis en mia lando la eduko de la reganta klaso. Eble por multaj (inkluzive min) tio sufiĉe pruvos la maladekvatecon de klasika eduko; sed, se oni ja deziras tian semantikeman edukon, Esperanto povas doni nuntempan « klasikan edukon » al multe pli da infanoj, malpli tempoperde ol la greka kaj latina, kun pli ampleksa, varia kulturo kaj sen la almenaŭ ŝajna absurdeco, por junaj senpaciencaj homoj, de lingvo « morta ».

La valoro de tia edukado estis precipe ke ĝi alkitimigis homojn al la zorga kaj foje eĉ iom artisma uzo de vortoj, per ofta tradukado kaj per verkado en la fremda lingvo. Mi mem scias ke tiaj ekzercoj tre akriĝas niajn perceptojn pri vortoj, kvankam mia tiaspeca edukado estis per modernaj lingvoj, precipe la franca. Ili ankaŭ iom helpas la koncentrigon de nia atentemo.

La valoro parte de lingva disciplino venas malfrue dum la studado de la greka aŭ latina lingvo. Estas ege malfacile lerni adekvate la lingvon mem, pro la komplikaj paradigmoj kaj multaj anomaliaj. Tiu tasko estas afero ĉefe de la memoro kaj de papageca ripetado; parte pro tio, infanoj lernas lingvojn multe pli rapide ol plenaĝuloj, kvankam infanoj apenaŭ komprenas tion, kion ili lernas. Nur homo kiu jam travadis oceanon de tiaj maŝinecaj tedaĵoj kapablas traduki aŭ verketi.

Nu, la gramatiko kaj paradigmoj de Esperanto estas tiel facilaj, ke preskaŭ iu ajn kiu sincere provas lerni ilin povas ellerni ilin dum kelkaj horoj, tagoj aŭ semajnoj, laŭ la individua memorpovo kaj inteligenteco. La vortprovizo estas pli longa tasko, kaj, same tiel en nacia lingvo, individuo probable neniam posedos la plenan vorttrezoron de Esperanto; sed post kelkaj monatoj oni povas havi vortprovizon adekvatan por ordinaraj aferoj. Kaj jen unu el la plej grandaj avantaĝoj de Esperanto: bona vortaro estas vere fidinda ilo eĉ al komentanto. Kun nacilingva-esperanta vortaro, kaj, poste, la *Plena Vortaro* por kontroli pri la trovita vorto, oni apenaŭ povas erari. Lingvaj ekzercoj iĝas multe pli afero de pura inteligenteco kaj intencita precizeco ol en iu ajn nacia lingvo.

Se do ni volas instrui infanon laŭ la klasikaj metodoj, ni povas fari tion pere de Esperanto; kaj, ĉar la lingvo mem estas pli facila, ni povas postuli multe pli altan artan nivelon, multe pli da realeco kaj senkliŝeco, ol en similaj latinaj aŭ grekaj ekzercoj. Tradukoj el Esperanto aŭ en Esperanton povas helpi al serioza pripensado pri la signifo de vortoj kaj pri ĝustaj ekvivalentoj. Infanoj povos verki eseetojn esperantajn sufiĉe frue.

Kaj, en la klasika edukado, la plej alta kultura afero estis la verkado de versoj, laŭ metriko tre fremda al la modernaj eŭropaj lingvoj. Kufime tiaj lernejoj verkoj estis tre kliŝoplenaj, estis preskaŭ pastiĉoj senintencaj. En Esperanto, laŭ mia iom hezitema opinio, multaj infanoj povus verki poemojn, kiuj, kvankam tre malofte artverkojn, sufiĉe ofte enhavas ian freŝecan sinceron, iom da homa vereco aŭ junokula observado. La kutima metriko de Esperanto multe pli nature sonas al nuntempa orelo, kvankam en Esperanto oni povas ankaŭ tre bele imiti la klasikajn metrikojn; kaj Esperanto disponigas vortprovizon adekvatan por la moderna mondo, malsimile al la klasikaj lingvoj, kiuj, por tiaj temoj, necesigas pezajn parafrazojn.

Do, se iu volas havi klasikstilan edukon, kiu ne estos nur ornamaĵo iom ne-realistisma de reganta klaso; se iu vere amas tiajn disciplinojn, ne pro prestiĝemo kaj tradiciemo, sed pro vera mensa ekzerco kaj respekto al la digno de vortoj, moderna ekvivalento, kultura sed ne snoba, nepre eblas.

Atanas D Atanasov — Ada

LERNU KAJ INSTRUU



Oka Leciono

MIAJ AMIKOJ

Nun, dum ni preskaŭ kuras tra la strato, permesu, ke mi konigu al vi ankaŭ tiel rapide miajn du amikojn.

Ili estas miaj amikoj jam de mia infana aĝo. Ni estas samaĝuloj kaj kreskis en la sama kvartalo. La infanaj ludoj proksimigis nin. Poste en la lernejo kaj en la gimnazio ni estis ĉiam en la sama klaso. Nun kiel junuloj ni restas intimaj amikoj, kvankam ni studas en diversaj fakultatoj de la universitato. Mi studas juron, Nikolao — matematikon, Marko — filozofion.

Jen al vi Nikolao : junulo forta, ne tre alta, iom diketa, rondvizaĝa, bruna. Lia tuta figuro elmontras sanon kaj ĝojon.

Kontraŭe Marko estas alteta, malgrasa, blonda, iom pala, kun brila rigardo.

Nikolao estas babilema. Li preskaŭ senjese parolas, gestas. Kaj li deziras, ke la aliaj aŭskultu nur lian parolon. Marko estas silentema kaj pensema.

Nikolao amas plej multe la sporton ; li estas pasia futbalisto. Marko emas pli al la scienco kaj la artoj ; li estas tre legema.

Nun tra la strato Nikolao ne ĉesas paroli kaj demandi pri Esperanto. Li estas entuziasmulo kaj rapide komencas flami. Jam la ideo pri internacia lingvo plaĉas al li. Li decidas lerni esperanton kaj en sia fantazio li jam estas esperantisto, li veturas en fremdaj landoj...

Marko estas skeptikulo. Li ne alprenas tiel rapide la novon. Li silente aŭskustas la babilojn de Nikolao kaj atendas, ĝis tiu ĉesos paroli, por doni kelkajn konkretajn demandojn. Liaj demandoj elmontras dubemon. Li deziras ke oni montru al li la esencon de la afero. Li deziras unue vidi propraokule, kion prezentas la internacia helpa lingvo, antaŭ ol formi al si definitivan opinion. Li estas videma kaj sciema.

Nu, en la kurso ili ambaŭ povos vidi kaj konvinkiĝi pri la esenco kaj la kvalitoj de Esperanto.

Proverboj. — Babilema amiko estas pli danĝera ol malamiko.
Ne helpas spegulo al malbelulo.
Por saĝulo - leciono, por malsaĝulo - bastono.

VERBO

Mi volas veni.

Verbo en infinitiva formo komplementas alian verbon, kiam la du verboj havas saman subjekton :

Mi volas veni = *Mi* volas ke *mi* venu.

Vi volas kanti = *Vi* volas ke *vi* kantu.

Mi volas ke vi venu. Vi volas ke mi kantu. Mi volas ke ĉiuj kantu.

En la lastaj propozicioj la subjekto de la ĉefa verbo estas unu, kaj la subjekto de la komplementa verba — alia. En tiu kazo la dua verbo ne povas esti en infinitivo, sed estas en volitiva formo (u-modo) ; oni ligas ĝin kun la ĉefa verbo per la konjunkcio *ke* : ke vi venu, ke mi kantu ktp. La konstruo *ke...-u* respondas al la subjunktivo en la latina kaj aliaj lingvoj.

RIMARKO I. — *Atentu pri la speciala uzo de infinitivo en frazoj kiel : Mi aŭdis lin iri (vidu lec. 7).*

RIMARKO II. — *La esperanta volitivo respondas jen al la imperativo, jen al la subjunktivo de la eŭropaj lingvoj, laŭ tio, se ĝi estas en ĉefa aŭ dependa propozicio. (P.V.).*

SUFIKSOJ

EM signifas : kiu estas inklina al tio, kion esprimas la radiko, aŭ kiu amas fari tion, kion esprimas la radiko (respektive la radikalo) (1) de la vorto. Laborema — kiu estas inklina al laboro, kiu amas labori. Legema — kiu amas legi. Sportema — inklina al sporto. Kantema knabino. Parolema homo. Mangema infano. Dancema. Videma. Sciema.

UL signifas personon, individuon pri kiu estas karaktera tio, kion esprimas la radiko (resp. la radikalo) de la vorto. Junulo — juna homo. Blindulo — blinda homo. Riĉulo. Belulino. Babilemulo — babilema homo, homo kiu amas babili. Samtempulo — homo de la sama tempo. Antaŭulo — homo, kiu vivis antaŭe. Posteuloj — homoj, kiuj vivos post la nuna generacio. Subulo — homo kiu servas, laboras, oficas sub la ordonoj de iu alia persono.

RIMARKO. — *Kiel escepto oni uzas tiun sufikson pli larĝe por esprimi en zoologio animalajn specojn : vertebrulo-besto, kiu havas vertebron ; rampulo-besto, de la klaso de vertebruloj kun malvarma sango (serpento, lacerto k.a.s. Ankaŭ por esprimi ekzemple nomojn de ŝipoj : trimastulo-ŝipo, kiu havas tri mastojn, ktp...*

NOTINDAJ VORTUZOJ

Konigi : Mi konigas al vi mian amikon.

Sciigi : Mi sciigas al vi tion = Mi sciigas vin pri tio.

EKZERCOJ

1. Nia instruisto volas, ke ni ĉiuj parol... esperante.

Mi insistis, ke ŝi nepre skrib... al li leteron.

En sia letero li petis, ke mi vizit... lin.

Li proponis, ke ŝi lud... je la piano.

2 Homo, kiu amas la ekskursojn, estas.....

- manĝi
- dormi,
- paroli,
- ŝercojn,
- rapidi.
- kritiki,

3 Malriĉa homo estas

- Brava
- Saĝa
- Malsana
- Feliĉa
- Sercema
- Ridema

4. Homo, kiu anstataŭas iun, estas lia.....

- mensogas
- pensas
- estas kontraŭ ni nia.....

(1) *Leg* estas radiko ; *legem* estas radikalo ; *pur*, radiko ; *malpur*, radikalo.

Vidpunkto de KIMIL pri

La Antinomioj de la Edukado

Ni respondas al la artikolo de F. Cadenel sub la sama titolo, laŭ la samaj ciferoj. Ni deziras ke ĝenerala diskutado sekvu, insistante pri la fakto ke ĝi ne povas resti pure teoria, sed bazita sur edukadaj faktoj kaj eksperimentoj.

1. — *La lernantoj estas infanoj.* Ni ne diru « kiujn la lernejo virigos... » Ĉar la trafa de edukado estas plej efika laŭ la unuaj momentoj de la vivo, do en la familio. La tuta medio natura kaj socia edukas la infanon kaj sen la lernejo ĝi ja (ofte eĉ plej bone) fiziologie virgus! Infano estas nek besto (aŭ ne nur besto), nek racia estaĵo. Sed tuj ĝi estas *sentanta* estaĵo. La fakto ke infano estas infano ne estas antinomio. La infano ne estas kreita por la edukado, sed la edukado por helpi la infanon adaptiĝi al sia medio.

2. — *La lernantoj estas infanoj; plenkreskuloj estas la edukistoj.* « Ilia psikologio ne estas la sama... » Ĉu la virina psikologio estas la sama kiel la vira? Ĉu tamen viro kaj virino ne estas tiaj, precipe por kunvivi kaj eĉ reciproke edukigi? La aŭtoro parolas kvazaŭ la plenkreskulo-edukisto devus trudi sian pensaron kaj agmanieron al la lernanto! La edukisto NE povas kompreni infanojn se li ne organizas la lernejan socion tiel ke la lernantoj trovu tie eblecon krei, labori, esprimi libere por la komuna deziro de ĉiuj; estas afero de praktikado de demokratio. Tiel, maljuna homo komprenas infanojn (kaj sin mem edukas!); tiel, viro komprenas knabinojn.

3. — *La hodiaŭaj lernantoj estas la morgaŭaj plenkreskuloj.* Ja la socio evoluas. La morgaŭa idealo ne estos precize la hodiaŭa. Sed historio havas orientadon. Certe ni ne iras al plia persona diktaturo, sed al plia demokratio. La sciencan morgaŭon ni malfacile povas imagi. Sed kiu diris ke, por eduki la infanon por la morgaŭa mondo, ni devas instrui la morgaŭan vivon??? Ĉu la industriaj teknikistoj ne tre rapide adaptiĝas al nova praktika eltrovo por ĝia plej rapida aplikado? Kial do la edukistoj vidus tie « antinomion »? a) Ne temas pri la instruado de la morgaŭa vivo, sed temas pri dono al infanoj de la rimedoj adaptiĝi kaj daŭre instruiĝi. Tia estas la vera edukado. Ni nur donas *minimumajn* bazojn, kaj precipe: la soifo al laboro, ŝercado kaj kreado; b) por tiu celo, kiel por rekte prepari la lernanton al la morgaŭa vivo, ni devas orienti lin al demokrata vivo. Kaj tion nur ni povas fari se en la lernejo, li vere ekpraktikas

demokratian vivon. Nunaj homoj ja ne estas sufiĉe maturaj por la *nepra* demokratio (nepra pro multaj soci-ekonomiaj kaŭzoj). Ni do kutimigu la nunajn infanojn al komuna demokratia mastrumado de la tuta lerneja laboro. Ni lasu flanke de la lerneja edukado la « ĉielan aŭ teran estontecon » ĉar la komuna ŝtata lernejo estas por ĉiuj, kredantoj aŭ ne; tio estas afero por la familio. Tamen se F. Cadenel volas precize diskuti pri tio (familia religia aŭ nereligia edukado), ni akceptas.

4. — *Al kiu el ambaŭ, individuo aŭ socio, oni donos la antaŭecon?* En tiu (kaj multaj sekvantaj) demandoj, la aŭtoro starigas multajn « antinomiojn » pli delikate solveblaj. Sed li konsideras la individuon kontraŭ socion, la patrujon kontraŭ la homaron ktp... tia estas la vidpunkto de la neevitebla diktaturo de socio kontraŭ homo, de familio kontraŭ infano, de patrujo kontraŭ civitano, de homaro kontraŭ patrujo! Sed la demokrata vidpunkto estas: organizado de la familio por la infano, de la socio por la homo, de la patrujo por la civitano (memoru pri la naskiĝo de la vorto « patrujo »!) kaj de la homaro por la patrujo. Jen la orientado, la emo de la progreso: libereco pli granda de la homo dank'al la socio, de la patrujo dank'al homaro, de la infano dank'al familio, lernejo, kaj socio! Kaj tia (kiel ni diris sub la antaŭa n° 3) devas esti la organizado de la lernejo, tiel ke ju pli la demokrata stato estas reala, des pli libera (por la vera vivo kaj kreado) estas la infano, kaj des pli natura, trafa, estas la disciplino.

5. — *Edukado uzas eksteran devigon, eĉ tridon kontraŭ aŭtonomion de la lernanto...* ĉar estas ne vera edukado. Ekzistas eksteraj neeviteblaj trudoj tute naturaj por la ekzisto mem de la medio (ni ne estas solaj!!!). Ne malbona estas tiu ekzisto kaj la infano, jam tre juna, ege laboras por adaptiĝi al la ekstera « stato », kiun li vere konkeras. Edukado helpu la pluan konkeradon. Kun la etuloj, la edukisto ja mem organizas helpan medion, ĉirkaŭaĵon. Iom post iom la infanoj mem partoprenas tiun organizon de la vivo por ke la lernejo helpu al ili por la konkerado de la socio.

6. — *Rapideco de ritmo de edukado kaj rapideco de akirpovo de la infano.* En la komenco, oni ja volas tro rapidigi la tiel diritajn « akirojn », t.e. konojn. Oni ĉiam pensas pri « konoj » kaj ne pri « povoj », t.e. kapabloj mem poste

instruigi. Oni ne helpas la infanon instruigi, sed oni « instruas » al li konojn laŭ tieldirite « racia » ordo, sed kies racieco ne priokupiĝas pri infana kapablo, anstataŭ ol *helpi* la infanon konkeri la tiel kuriozajn konojn ! Fakte, oni naŭzigas la infanon pri studo. Da la rapida ritmo estas nur ekstera, videbla : oni fieras pri ripetado de ne vere komprenitaj konoj. Tial oni devas rekomenci lerni la *samajn* studojn de la 8-a ĝis la 20-a aĝ-jaroj ! Sekvante la naturan ritmon de la infanaj tre viglaj interesoj (laŭkondiĉe ke ili *lernu*, serĉu, sed ne *estu lernigataj*) estas fakto ke la lernantoj studas iomete pli malfrue, sed multe pli profunde.

7. — *Samaj lecionoj al diversaj infanoj.* Estus tre longe praktike pritrakti tion. Oni devas lerni komune la komunajn interesojn ; sed kiam, en komuna diskuto, kie la instruisto estas *helpanto-direktanto*, oni devas dispartigi la serĉ-laboron inter grupoj aŭ lernantoj, oni devas al ĉiu la parton kiun li kapablas plenumi. En la grupoj mem ekzistas interhelpo, kiu permesas al ĉiu fari pli, ol li sole kapablas. Tio estas demokratia !

8. — *Por savi la infanon de la « medio-influo »...* la politika celo estus unue krei *bonan* medion. La eduka tasko ĉiam, pere de la familia, lerneja, asocia medio, estas doni sufiĉe da rezistopovo al la infano. Mi nun, se estus loko, povus rakonti pri mia propra zorgato, ĵus mergita (sed ne droninta) en la danĝeran parizan vivon. Sed por tio estas nepra la edukado favora al persona iniciato (demokratia !) kaj *ne* la « edukado » kie ĉiam la infano devas obei.

9. — *Ĉu edukado devas prezentiĝi kiel ludo ? Ĉu oni devas postuli de la infano senpaŭzan kaj penigan streĉon ?* Tio dependas de la maniero laŭ kiu la infano agadas !! Ni ofte vidas etan infanon tre arde okupiĝi, tiom, ke por li tio estas vera laborado... kaj tiu laboro daŭras plenan duontagon sen peniga streĉo nek laceco.

Multaj eksperimentoj kaj observadoj pruvigis ke la *laboro* estas pli ŝatata de la infano ol la sencela ludo. Rigardu nur viajn infanojn libere ludi : ili tiam vere laboras (per iloj, sablo akvo ktp.) aŭ imitas plenkreskulan laboron (panjo kun infaneto ktp.). Ili plej ŝatas konstruludilojn. Ili poste muntas elektrajn aparatojn, faras modeletojn laŭ ŝipoj, trajnoj, aviadiloj...

Ni nur utiligu tian laborpovon ! La vera krea, funkcia laboro ne estas streĉe laciga kaj oni poste bone dormas ! Eĉ se tio estis *stud*laboro. Okazas, ke dum horoj 6-jaraj infanetoj pentras ! La instruanto nur vidas lacecon, kiam la juna-

pentristo komencas fuŝeti. Li eĉ ne konscias pri tia laceco, kaj tiam sufiĉas, ke la instruisto al li diru : « Vidu : nun vi estas laca, haltu, kaj estu tute trankvila, morgaŭ vi rajtos denove pentri ! »

Edukado ne devas prezentiĝi kiel ludajo : tiam okazas ke la infano baldaŭ streĉiĝas kaj naŭzas, tute kiel ĝi forŝiras belan pupon per kiu li nun ne scias kian laboron fari. Edukado nur devas permesi kaj helpi la naturan egan laboremon de la infano. Por tio estas necesaj naturaj teknikoj kaj ties materialo (*ilaro*) per kiuj la infanoj povu fari memlaboradon per kiu ili *kreas* ion.

Konkludo ? — Se starigas antinomiojn en la edukada tasko, ni povas konstati ke ili fakte ne ekzistas pro la vivo mem, sed pro netrafa edukado, kiu precize ne okupiĝis pri la nesengeblaj leĝoj de la vivo ! Le scienculojn neniam diras ke ekzistas « antinomioj » en sia adaptado de scienco al la praktiko ! Ili konkludas tiel : « Ni ankoraŭ ne trovis la ĝustan rektan naturan solvon ; ni ankoraŭ miskomprenis ion pri la naturaj leĝoj. Novaj eksperimentoj ankoraŭ estas necesaj ». Tamen iaj pedagogoj diras : Ekzistas antinomioj inter tiu aŭ alia aspekto de la vivo ». Aliaj, pli apudaj al la vivo, aldonas : « Ni devas diskuti pri tio por trovi ». Sed se tiu diskutado restadas pura teorio, aŭ sekve de nur ĉambra ekzperimentaro, ĝi rondiras laŭ la ĉiam sama cirklo. Nur kolektiva komparo de travivaĵoj en popol-lernejoj povas solvi, kaj solvas la aferon.

Roger LALLEMAND.

Informoj

Esperanto-Festivalo estas titolo de bone prezentita roneotipita bulteno eldonita okaze de la 6-a Festivalo de la Junularo kaj Gestudentoj por Paco kaj Amikeco (Moskvo 1957). La unua numero donas ĝeneralajn informojn sed mankas facile troveblaj indikoj : adresoj ? datoj ?

Tiu manifestacio organizata de la Internacia Federacio de la Demokrata Junularo atendas 30.000 gejunulojn krom el Sovetio. Esperanto-kunveno okazos.

42-a *Universala Kongreso de Esperanto* Marsejlo (3-10 Aŭg. 57).

Ni memorigas ke la lasta limdato por enskribiĉo estas la 30-a de Junio. Nunaj kotizoj : Kongresano : 3.000 fr. la edzino 1.500 fr., gejunuloj 1.000 fr. Adreso : 32. Cours d'Estienne-d'Orves, Marseille.

Estos ludata teatraĵo de Molière : *Georgo Dandin*, dank'al niaj Barcelonaj Sanoj. Nepre aliĝu kaj ĉestu la kunvenojn de nia Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.).

Herbert Schuler

Malfacilaĵoj en la legolernado

En la IPR 1-57 GROENDIJK raportas, ke en Usono « Eĉ post multjara lernado multe da infanoj ne kapablis rekoni simplajn vortojn... »

Tiu problemoj ne nur ekzistas en Usono — estas grandega en landoj, en kiuj jam la 6-jaraj infanoj devas komenci la legolernadon.

En Danujo ekzemple estas multe da infanoj legasteniaj*. Oni instruas ilin en specialaj klasoj kun nur 15 infanoj 2-3 jarojn, ĝis ili estos « sanaj ». (3)

Profesoro PROBST en Bazelo, Svislando raportas, ke hodiaŭ multaj infanoj bezonas por la legado de trisilabaj vortoj tri jarojn antaŭ du. (1)

Universitata profesoro germana skribas, ke la malfacilaĵoj en la lego-kaj skribo-lernado rapide pligrandigas. (1)

En Hamburgo oni aranĝis simile kiel en Danujo specialajn klasojn por la skribo- aŭ lego-asteniaj infanoj. (1)

Eble la kaŭzo por kelkaj kazoj estas maltaŭga metodiko aŭ mankoj de la instruisto. Sed ĉu tio estas la solaj kaŭzoj? Oni diras ŝercante: « Ne ekzistas metodo kiu povus malebligi, ke normala infano lernus legi! » La historio de la legolernado pravas tion.

Ĉi tia ŝercvorto parolas pri *normala* infano. Oni do povus diri: « Eĉ per la plej bona metodo la nenormala infano ne lernas legi (en la ordinara tempo)! « La problemoj nun estas, kia infano estas « nenormala » rilate al la legolernado.

Pluraj kaŭzoj troviĝas por tio. Devus esti memkompreneble, ke infano malinteligenta havos gravajn malfacilaĵojn en la legolernado kaj ke tiaj infanoj eĉ post multjara lernado ne kapablos rekoni simplajn vortojn.

Sed ekzistas ankaŭ *inteligentaj* infanoj kiuj lernas tre malfacile kaj malfrue legi. Multaj gepatroj aŭ instruistoj kredas, ke tiaj inteligentaj infanoj nur estas nediligentaj aŭ neatentaj kaj ili traktas ilin nejuste. « Ili povus, se ili nur volus! » plendas gepatroj kaj instruistoj. Ili ne scias, ke tiaj infanoj estas legasteniaj, kiuj per tio devas ofte grave suferi.

La svisa kuracisto kaj pedagogo M. TRAMER skribas, ke oni ne rare trovas infanojn legasteniajn, kiuj estas bone aŭ eĉ bonege talentitaj! « Eĉ en la superaj klasoj oni trovas, kvankvam rare, lernejan kun tia astenio... La kaŭzo de la legastenio aŭ legonekapableco (aleksio) estas en la konstitucio... Aŭ estas malsano de la cerbo... » (5)

LANGE-COSACK kaj WISSEL (4) raportas pri tre interesaj kazoj de inteligentaj legasteniaj personoj: Brita oficiro devis

kiel infano legastenia pli suferi en la lernejo ol dum sia trijara frontoservo en la dua mondmilito!

Kaj la generalkuracisto DRENKHAN povis dank'al sia tre alta inteligenteco sukcese plenumi la lernejojn, sed li havis per sia legastenio grandegajn malfacilaĵojn kaj ne rare fatalajn spertojn. Ekzemple anstataŭ « Corvus alba rara avis est » (Korvo blanka rara birdo estas) li legis kaj tradukis « Corvus alba rana aeris est » (Korvo blanka rano de la aero estas). Li mem diris: « Mi ne povis legi! »

Alia kaŭzo estas ke multaj infanoj devas iri en lernejojn kaj komenci la legolernadon sen esti maturaj por tio. Multe da instruistoj kaj gepatroj ne scias aŭ pripensas, ke antaŭ 50 jaroj la plej multaj sesjaraj infanoj estis lernejomaturaj, dum hodiaŭ nur 10 procentoj de la sesjaraj infanoj estas lernejomaturaj (laŭ raporto de la Medicina Informoservo en Münster).

Tiaj infanoj ne povas legolerni en la sama tempo kiel la maturaj infanoj. Ja ekzistas la danĝero, ke per la tro frua lernokomenco ili suferos « korpajn difektojn kaj psikajn perturbojn ». (2)

« La ludo en la sablo estas por tiaj infanoj multe pli grava kaj ĝusta ol la sidado dum horoj en lernejobenkaĵoj. » (3)

Oni do devas atendi ĝis la infano estos matura. Eĉ la plej bona metodiko havas ĉe nematuraj infanoj malmultan aŭ tute nenian sukceson, ĉar mankas la antaŭkondiĉo por la kompreno kaj lernado.

La legolernado povas esti malfaciligita aŭ malebligita de (senkonscia) sinteno kontraŭ ĉiu spirita laboro, de lernejoj, aŭ de tro severa instruisto (laŭ raporto de la eduko-konsilejo Essen). (1)

FROMMBERGER atentigas ke la legolernadaj malfacilaĵoj pligrandigas, se la instruisto severe postulas lernoprogresojn kaj se gepatroj kaj instruistoj estas neprudentaj, neraciaj.

Resume ni povas konstati: Ekzistas hodiaŭ pli da legolernadaj malfacilaĵoj ol antaŭe. Bedaŭrinde oni kalkulas tion al la « novaj metodoj » kaj al la instruisto, kiel ankaŭ faris la artikolo en *Colliers Weekly* citata de GROENDIJK. Tia neĝusta kaj nejusta opinio perturbas tiajn instruistojn, kiuj ne scias la verajn kaŭzojn kaj nun komencas dubi pri sia metodo aŭ eĉ pri siaj propraj instruadokapablecoj. Sed ankaŭ plej malbonaj estas la nejustaj akuzoj de la gepatroj, kiuj ĝenas la bonan kaj necesan kunlaboradon inter instruisto, infano kaj gepatroj.

(Fino sur paĝo 69)

Esperanto en la Lernejo



La jena artikolo aperis en marta kajero de la gazeto « Franca Esperantisto » en la jaro 1909. Repris ĝin « Internacia Pedagogia Revuo » en sia maja n-ro 1909. Ni publikigas ĝin, ĉar ankaŭ ĝi estas aktuala. Krome ni aldonu ke tiu republikiĝo ŝuldiĝas al duobla iniciato de Lille'ano kaj de Jugoslavo. — Red.

Oni scias, ke Lilo (Lille) estas fokuso de propagando, sed oni ne scias, kiel tio fariĝis.

Antaŭ kvin jaroj, kvazaŭ okaze, mi sendis al mia inspektoro, S-ro MINET, noton pri la taŭgeco de Esperanto por konigi ĉefverkojn. La noto estis apogita per fakto : dank'al Esperanto pola kolego ĵus malkovris « La Fontaine ».

Surprizo ! Sekvantan monaton, mi trovis mian raporteton en « Le Nord Pédagogique ». Fide mi daŭrigis informi la estron ; fidele, li publikigis la informojn.

Dume, mi senbrue instruis Esperanton al miaj knaboj per eksterklasa kurso.

Iam venis Inspektoro. Pro kutimo lernantoj ellasis esperantajn vortetojn. Tio plaĉis al la vizitanto. Li gratulis la edukatojn, pravigis la edukiston, kaj favore raportis al akademia inspektoro.

Dum jaro 1905, laŭ peto de S-ro MINET, mi publikigis priesperantan kurson en « Le Nord Pédagogique ». La kurso rekoncigiĝas ĉiujare. Ankaŭ kaj ankoraŭ daŭras artikoloj, en kiuj mi ofte insistas pri la pedagogia valoro de Esperanto.

Iom post iom fariĝis pli plena kaj praktika mia instruado. Baldaŭ mi sendis al mia realigema Inspektoro eksterlandajn poŝtkartojn ricevitajn de miaj lernantoj. Fine li pensis : kio estas farata ĉe la lernejo « Montesquieu » tio estas farebla en mia tuta distrikto.

Dum marto 1907, post konsento kun sia estro, S-ro MINET sciigis al sia personaro, ke post aŭgust-septembra libertempo, oni devige instruos Esperanton ĉe la superaj kursoj de la elementaj lernejoj kaj ankaŭ ĉe la komercaj sekcioj de la superaj lernejoj. Ĉiu aranĝis sian tempuzadon por doni ĉiusemajne du tridekminutajn lecionojn, kaj de l'monato oktobro 1907 ĉirkaŭ 1200 gelernantoj konstante lernas Esperanton en niaj lernejoj.

Por sin prepari al la nova instruado, ĝeinstruistoj laŭvole de aprilo ĝis julio sekvis specialan kurson.

Por kroni tiun organizadon, oni starigis ĉiujaran ekzamenon kun diplomo. Unua ekzameno okazis dum julio 1908. Kvarcent geknaboj plenumis la provojn (tradukoj al- kaj el-esperanta, legado klarigata). Tricent-tridek-naŭ ricevis diplomon solene disdonitan kun la premioj.

Vi scias, kiom babilema estas la gazetaro esperanta. La Lila organizado rapide diskonigis. El multaj landoj mi ricevis

kaj ricevas detalpetojn, ĉiam kompleze respondatajn.

Jen estas kiel Lilo fariĝis fokuso.

Mi rakontas tion ne por fieriĝi, ĉar mi estas pli ŝancema ol lerta, sed por instigi kolegaron kaj estraron. Modesta instruisto povas nur provi laĵ pruvu ; aliaj decidus. Mi provis. La semo falis sur bonan teron. Ne semante, kiel koni teron ? Kiel plibonigi, se oni ne uzas kulturadon ?

Ni ŝajnas senpovaj. Tamen nia rolo estas potenca : amigi sube, ŝatigi supre. Do, ni instruistoj, komencu. Ni montru per faktoj, ke Esperanto estas ilo de pedagogia kaj socia progreso. Respondaj estroj senpruvaj ŝanceliĝas, atendas kaj ne decidas. Ĉiunonate, mi raportos pri tutmonda lerneja agado. Sed ne timu, mi ne plu donos konsilojn.

F. DURIEUX,

Direktoro de la « Montesquieu Lernejo » en Lille (1909).

MALFACILAJOJ en la LEGOLERNADO

Fino de la paĝo 68.

La veraj kaŭzoj en la plej multaj kazoj ne estas maltaŭga metodiko aŭ mankoj de la instruisto, sed malinteligenteco de la infano, nelernomatureco, legastenio kaj aliaj supre anoncigitaj kaŭzoj.

Espereble donas tiu artikolo la respondon al la « drameca » demando en *Colliers Weekly*, kiu estas same la demando de multaj gepatroj en la tuta mondo : « Kial oni ne sukcese instruas legi al mia infano ? »

BIBLIOGRAFIO :

(1) FROMBERGER H., Das Sitzenbleiberproblem. Dortmund 1955.

(2) HUTH A., Seelische Lebenshilfen. Speyer 1955.

(3) KERN A., Sitzenbleiberelend und Schulreife. Freiburg 1951.

(4) LANGE-COSACK und WISSEL, Verhaltensstörungen bei Kindern mit Leserechtschreibeschwäche (Legasthenie). *Praxis der Kinderpsychologie und Kinderpsychiatrie*. Göttingen 1956.

(5) TRAMER M., Schülernöte. Basel 1951.

GLOSO :

Astenio : Senforteco (medicina termino internacia).

B. SWARSENSKI

La Histori-Leciono

(Prof. Historikus aperas en la klaso kaj supreniras la katedron.) Sidiĝu! — Vi tie! Vi! — Jes, Vi! en la unua, dua tria (Sulce, vi devas tiel sidi, ke mi povas vidi ankaŭ la malantaŭulojn! —) kvara, kvina, sesa, sepa benko, dekstre ĉe la angulo! — Kiel vi do nomiĝas? Kolbasoj? — Jam sufiĉas! Neniun respondon! Vi devas silenti parolante kun mi! — Sidiĝu! Kiu forestas?! — Jes, jes, mi ree vidas tre multajn, kiuj ne estas ĉi tie. Generale forestas lastatempe tiel multaj, ke mi baldaŭ devos starigi apartan benkon por la forestantoj. Do! — *La lastan fojon ni haltis ĉe — Rozembaum, fermu la fenestron!* — *Ĉe la ekzemplo de herokuraĝa defendo de la patrujo — sen bruego, Rozembaum, tute fermi — tiel!* — *de la Termopiloj per la Spartana princo Leonidas.* Skribu nun: *La vorto Termopiloj* — Ha, bone, ke mi rememoras! Alvenis du novaj lernantoj. Ili leviĝu. Kiel vi nomiĝas? Kiel? Fric Felkerlink? Kaj vi? Felkerlink Kuno? — Ĉu vi do estas fratoj? Tiel! — Felkerlink, Fric, kiam vi naskiĝis? — La 15-an de Aprilo 1902. Kaj vi, Felkerlink, Kuno? — Ankaŭ la 15-an de Aprilo 1902. — Tiam vi eble estas ĝemeloj?! — Felkerlink, Fric, kaj kie vi naskiĝis? — En Lukenvalde! — Kaj vi, Kuno? — Ankaŭ en Lukenvalde. Sidiĝu! Kaj mi esperas, ke la pliaĝa frato antaŭiru la malpliaĝan per bona ekzemplo. — *Mi daŭrigas: La vorto « Termopiloj », skribu! signifas, kiel ili ne verdire jam devus scii, Fiknabaĵojn, mia kara Bretŝnejder, mi ne toleras, konate, en mia leciono! — signifas la pordego de la varmaj — Kolbasoj!* se mi surprizos vin ankoraŭ unu fojon gratante, mi forpelos vin tra la pordo — *fontoj. La pordego de la varmaj fontoj!* Kserkses, la reĝo de la Persoj, sendis al la Lakedajmonioj kurieron kun la postulo: Donu al mi fine la ŝnureton, vi infana homo tie malantaŭe, mi ne povas plu rigardi la ludaĵojn — *kun la postulo elliveri la Pluvombrelojn, mia kara!* Kolbasoj! oni metas belele en la angulon, kie ili ne renversigas ĉiun momenton. — Naŭze! — *Elliveri la armilojn. La fiera respondo de la Greka princo estis: Vi, Hibner, ne kuŝu el la fenestro. Kion vi pensus kiel diligenta lernanto, se vi preterpasus malsupre, kaj vi vidus vin tie supre maldiligentumi?* — *Mi volis diri, la respondo estis: Venu kaj prenu ilin! Kaj kiam la Persoj res-*



...kun la fiera nomo... — Vi! Kolbasoj...

pondis: Ilia nombro estas tiel granda, ke iliaj saĝoj malheligas la sunon, Leonidas respondis malestime: Kolbasoj, ne rikanu tiel impertinente, vi stulta kreitaĵo — respondis Leonidas: Des pli bone ni batalos en la ombro. Kvar tagojn pli poste ĵetis sin la elito de la Persa armeo kun la fiera nomo: Hirzemejer, Leman, Kaliĉke, Piĉ kaj Kolbasoj raportu sin post la leciono. Impertinente-co! Mi instruos vin balanciĝi dum la instruo — Kun la fiera nomo « La senmortaj » sur la malvastan trairejon, sed vane. Tiam fine montris perfida Greko kun la nomo — Kohn II, ĉu vi do ne havas naztukon?! Vi tro multe arogas! — montris Efiattes al la Persoj sekretan vojeton kaj subite disvastiĝis inter la Spartanoj la terurkrio: — Kiu ĵetas tie per papergloboj? — La krio: Oni atakas nin de malantaŭe! — Sekve de tiu ĉi sciigo Leonidas forsendis siajn alianc-trupojn; li mem kaj siaj 300 — ŝafkapoj, kiel vi, Kolbasoj, apartenas je Dio al infangardeno — 300 Spartanoj daŭrigis batali kaj mortis tiun glorplenan kaj memorindan morton por la patrujo, je kies eterna memoro oni konstruis pli poste monumenton kun surskribo, kiu en preciza metrika traduko tekstas jene: Cielfulmotondro! Nun troiĝas al mi. Por kio vi ĉiuj devas paroli tiel laŭte? Kio? Se junuloj volas paroli pri sia instruisto, ili devas esti aŭ tre maljunaj aŭ tute silenti pri tio. Mi ne komprenas mian propran vorton! Kolbasoj! Ne kriegu! Kolbasoj, ekstaru, kiam mi parolas kun vi! Prenu ĉapelon kaj ĉapon kaj forlasu momente la klason, kaj se vi ĝis la venonta histori leciono ne scios parkere la enhavon de la hodiaŭa, tute precize tiel, kiel mi nun paroladis ĝin, vi ekkonu min. Sekundanoj vi volas esti?! — Indianoj vi estas! — Hordo! Fino!

(La sinjoro histori-profesoro eliras furioze je solena sonorilado).

INFORMOJ

ANONCETOJ

28-jara hungara mezlerneja instruisto deziras korespondi pri eduko, pedagogio, historio de eduko : Otto Vag, Budapest XI, Lagymanyosi u. 12, Hungario.

Geinstrustoj ekster Francujo en kaj ekster Eŭropo, rilatu kun F-ino Delbart, 124, bd Victor-Hugo, Calais, Francujo, por kontaktigi geknabojn 12-14-jarajn jam lernantaj Esperanton. Celo : krei vivantan kurson pri tutmonda geografio.

S-ro Jehézekel Dorn, c/o Pinchas Nasich, Rishon Le'zion, Lubman St. 17, Israelo, deziras kontaktojn por kreo de *Vegetara Internacia Kolonio*, verŝajne en Brazilo, bazita sur Internaciismo, Vegetarismo, Koopera laborsistemo kaj agrikulturo. Materialo estas nun kolektata por la unua numero de bulteno dediĉita al Vegetara Internacia Kolonizo : ĝi entenas la projekton kaj artikolojn, sugestojn kaj proponojn de korespondantoj.

Konstantan Esperantan Atlernejon celas krei la Karlskoga E-Societo (c/o E. Bonander, Kungsvagen 5, Karlskoga, Svedio). Por tio ili petas vian helpon jene : sendu artaĵojn bonkvalitajn (oleaj, pentraĵoj, akvareloj, paŝteloj, desegnoj, ĉio originata) Ekspozicio kaj posta vendo utilos par kreskigi fonduson de jam 10.000 sv.kr. akirintaj per simila procedo. La Atlernejo ekfunkcios en aŭtono 1958, komence en pruntita ejo.

Kiu franco deziras reciprokan gastigadon Marseille-Bulgario tuj skribu al la redakcio por plua informo.

Libron pri la vivo de Zamenhof deziras verki, S-ro Norman WILLIAMS estro de Egerton Park County Secondary School, Denton, Manchester. Kolektas por tiu celo informojn eĉ plej detalajn. Deziras interkonatiĝi kun personoj kiuj konis Zamenhofon, lian familion, liajn domojn; ankaŭ kun personoj kompetentaj serĉi informojn en la arĥivoj kaj bibliotekoj de la urboj konitaj de Zamenhof.

Por afranko kaj kromaj elspezoj donacis :

S-ano Skopalik	2 kĉs.
S-ano dir. J. Krča	2 kĉs.
S-ano Bl. Stefek	2 kĉs.
S-ano O. Vyhnał	1 kĉs.

ĉiuj el Ĉeĥoslovakio.

Al la donacintoj, dankas.

La Administracio.

ESPERANTISTA SEMAJNO

Ĉe Mediteraneo-bordo, sub tendo, de la 25-a de Julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Informos Lentaigne, 3, avenue de la Gaillarde, Montpellier, Francio.

★★

Kongreso de T.E.J.O. (Junularo), Ville-neuve-lès-Avignon (27 Jul.-2 Aŭg. 57). Adreso por informoj : S-ro R. Motto, Rond-Point de la Gare, Avignon (Vaucluse), Francio.

Foiro de Bolonjo, Italio (8-22 Maj 57) kiu oficiale uzas la internacian lingvon eldonis belan prospekton en Esperanto. Bedaŭrinde ĝi alvenis tra malfrue por anoncado.

BONVOLU NOTI KE LA JANUARA KAJ FEBRUARA NUMEROJ ESTAS TUTE ELĜER-PITAJ.

ESPERANTO INSTRUATA EN ĈINAJ UNIVERSITATOJ

Pekino, aprilo. En la Universitatoj de Pekino kaj Tienzin formiĝis kursoj de Esperanto, grandnombre vizitataj de la ĉinaj studentoj. La Internacia Lingvo estas instruata ankaŭ en Chungking, Ŝanhaj kaj en multaj urboj de Ĉinujo. En Pekino okazis, inter aliaj manifestacioj, malgranda ekspozicio kun 400 diversaj libroj en Esperanto. La intereso por la Internacia Lingvo senĉese kreskas en Ĉinujo kaj en la tuta Azio. (I.G.S.).

PLI BONA ESTONTECO POR LA MENSE NENORMALAJ INFANOJ

Mense nenormala infano havas hodiaŭ pli bonan ŝancon esti edukita por vivi utilan vivon ol estis eble antaŭ 50 jaroj. Tamen eĉ hodiaŭ tio verŝajne estas escepto pli ol ordinarajo, ke subnorma infano ricevas okazon plene tiligi siajn eblecojn. Ĉe internacia semajno en Oslo oni klopodos kunigi siajn spertojn pri modernaj metodoj rilate neevoluintajn infanojn, kaj pli ĝenerale disvastigi tiajn informojn. Partoprenantoj sin okupos pri ĝeneralaj pozitivaj rimedoj por plibonigi mensan sanon, tiel ke la infanoj kiel eble plej multe ricevos helpon de la edukado, kaj iam prenos sian lokon en la socio.

(Laŭ Unesco-Features kaj U.E.A.-Informservo).

DISTRA PAĜO

KONKURSO N° 6

Gajnintoj : S-ro Couwenberg, F-ino Hanson, S-ino Lavallée, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, F-ino Texier gajnis 2 poentojn, S-ro Génuit gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 7

Jen la solvo :

Horizontale. — 1. Koloraturo ; 2. Olem, Irab ; 3. Meĉ, La, Ons ; 4. Pŝ, Kino, Ot ; 5. Altaro ; 6. Neolit ; 7. Es, Otit, Or ; 8. Nia, Oz, Uni ; 9. Temo, Krik ; 10. Ombroplena (inverse).

Vertikale. — 1. Kompetenta ; 2. Oleŝ, Sien ; 3. Leĉ, An, Ame ; 4. Om, Kleo, Ol ; 5. Litoto ; 6. Analiz ; 7. Ti, Orit, KR ; 8. Uro, Ot, Urb ; 9. Rano, Onim ; 10. Obstetrikio.

Gajnintoj : S-ro Bourry, S-ro Couwenberg, S-ro Génuit, Ges-roj Lanz, S-ino Lavallée, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, F-ino Rubin, F-ino Texier, S-ino Villette gajnis 2 poentojn.

F-ino Arnould gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso S-ino Reyneau gajnis 345-frankan libron.

Ni gratulas ĉiujn gajnintojn.

KONKURSO N° 9

Vertikale :

1. Butiko.
2. Eliĝas.
3. Prefikso ; inverse : kolekto da leĝoj ; prepozicio.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2		■								■
3			■							■
4				■				■		
5					■					
6						■				
7				■			■			
8			■						■	
9		■								■
10										

4. Ekstrema flanko de konstruo ; sufikso ; ligna glitilo (r).

5. Pasante tuŝeti ; inverse : aro da feraj stangoj.

6. Elemento de formulo ; inverse : trinkajo.

7. Kvalito ; fonetike laŭ la literoj : magazeno ; inverse : filo.

8. Inverse : sufikso ; Afrika loĝanto (r) ; flava metalo (r).

9. Rajdantino (r).

10. Prezentas rezonajn pruvojn.

Horizontale :

1. Dependanta de superulo.

2. Enhavanta oleon.

3. Dependiga konjunkcio ; farbo ; produkti ian efikon (r).

4. Inklino al io ; inverse : pronomo ; ŝatu kare.

5. Ĝojbrila aspekto (r) ; inverse : tago.

6. Elektrodo ; parto de lakto (r).

7. Vira vesto (r) ; konjunkcio ; aŭbla (r).

8. Inverse : dependiga konjunkcio ; bonfarto ; fonetike laŭ la literoj : skriba resumo.

9. Saltinsekto.

10. Iras laŭ kliniĝanta direkto.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de la venonto monato al S-ro Guillot, Cours de la 4-République, Gaillard (Haute-Savoie), Francujo.

INFORMOJ

JURNALISTOJ KAJ VERKISTOJ ESPERANTISTAJ !

Anoncu vin al la « Tutmonda Esperantista Journalista Asocio », sekretario redaktoro G.N. Jepsen, Skovvangen 17, Silkeborg, Danujo. La jarkotizo estas nur 1 dolaro (aŭ 12 internaciaj resp.-kuponoj aŭ 14 steloj) sendota al la kasisto s-ano A. Ribot, 11, rue Paul-Vergnes, Marmande, Francujo. Regule vi ricevos nian bultenon !

★★

NIA VIVO

Paulo Amarin Kardozo Ido naskiĝis ĉe gesamideanoj Paulo Amarin Cardoso kaj Mires Meireles Cardoso en Fortaleza-Ceara (Brazilo). Gratulojn.

PERANTOJ DE I. P. R.

AUSTRA : O. St. R., Dr. E.J. GOERLICH, *Wien*, IX. *Waehringerstrasse* 59. (Poŝtĉeka konto : 30.461).

Jarabono : 32 aŭstraj ŝilingoj.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, *Holland Park Avenue*, *London*, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : *Bulgara Esperantista Asocio*, *Sofia*, Bul. *Stalin* n° 40.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », *Ingemannsvej* 9, *Aabyhof*. (Ĉek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : *Helmut ROSSLER*, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, *Friedensstr.* 15. Ĉek-konto : 43 357 *Ludwigshafen/Rhein*.

Jarabono : 48 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. *Gral Sanjurjo*, 7, *Tarragona*. (Konto n° 956-293 ĉe « *Banco Espanol de Credito* »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : *Eduardo ZUMBO*, *Casella postale* 226, *Torino*.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : *Josip VAJDLIH*, *Podolje* 15, *Zagreb*. (Ĉekkonto : *Gradska ŝtedionica Zagreb*, 40-KB-6 n° 4653).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : *Erling HOLTEN*, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8,50 kronoj.

NEDERLANDA : S-FO VERBRUGGE N, *Oosterhesselenstraat* 560, *Den Haag*.

POLA : « *Asocio de Esperantistoj en Pollando* », ul. *kozia*, 3, *Varsovio*.

SOVET-UNIA : *Roberto DVORKIN*, *Esperanto-Sekcio de Kulturdomo*, *Leningrad*, 22, *Kirovskij* 42.

SUOMA : *Joel VILKKI*, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », *Box* 19071, *Stockholm* (Poŝtĉeka Konto : 578)


Jarabono : 6 kronoj.

USONA : *Jarvis E. BUSH*, 3.700 *North 75-th Street*, *Milwaukee* 16, *Wisconsin*.

*
**

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDOIT, 6 *rue de la Paix*, *Baugé* (M.-et-L.) *Francio*. (Poŝtĉeka konto : 143-867 *Nantes*). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio
Tél. 34

FRANCA KULTURDOMO

Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

1-a Periodo : 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto
Turismaj karavanoj

2-a Periodo : 14-an de Julio — 24-an de Julio

Sensacia Manifestacio :

Kulturaj Internaciaj Ferioj

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

3-a Periodo : 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

La Franca Lingvo

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

4-a Periodo : 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

Somera Lernejo - Tri kursoj de Esperanto

5-a Periodo : 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

Fakaj Renkontiĝoj - Liberaj Ferioj